RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
04/12/2014 19:33:16

Sesiis en Havano la konferenco internacia Bioteknologio 2014.

Kun la ĉeesto de sciencistoj el 34 landoj finiĝis en Havano la internacia kongreso *Bioteknologio 2014* kies lasta konferecno pritraktis la kontribuojn de tiu branĉo al mastrumo integrita de plagoj.

Pri tiu ĉi temo prelegis Alberto Pantoja, prizorganto de produktado kaj protekto de kultivoj en reprezento de la organizo por nutrado kaj agrikulturo de UN (FAO).

Alia elstara partopreninto estis la profesoro Sjef Smeekens, de la nederlanda universitato de Ultrecht kiu prelegis pri la signaloj de la sukero en la kontrolo pri kreskado de plantoj.

La evento sesiis kun la ĉeftemo *Agrobioteknologio por la agrobrutara daŭripovo* kaj ankaŭ okazis simpozio pri molekula interago inter plantoj kaj patogenoj.